

# KOMENCANTO

---

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



**Maŝa Terjoĥina**  
[ ULJANOVSK, Ruslando ]

---

2000

redakcie — literatur-historiaj paĝoj — aforismoj — E-to kaj  
vojaĝoj, sperto 1958 — paĝoj por bonhumoro — filozofaj  
rezonoj de antikva Ĉinio — vort-ĉeĥoj anekdotoj —  
korespondu!

5

# PERANTOJ de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

## ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

## AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

## BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

## BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

## ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

## DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

## ESTONIO

Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

## FRANCIO

- Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

## GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

## IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

## ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

## ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

## KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460

Playa 11300, HAVANO

## LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

## NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

## POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

## SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

## SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

## USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

# redakcie

Karaj legantoj!

Vi tenas en la manoj la vican numeron de la gazeto kun originala desegnaĵo de Maŝa Terĵohina sur la kovrilo.

Ni daŭrigas rakonti pri E-literaturo kaj dediĉas la literaturspacon al du aŭtoroj: Stanislav Schulhof kaj Pál Lengyel.

Sur la kutima loko vi trovos la kolektojn de aforismoj.

Florian nad Metuji el Nederlando prezentas <sup>part</sup>ŝperton de sia vojaĝo al Prahao en 1958. Post ŝiaj taglibraj priskriboj por atentema leganto kaŝiĝas multo de interesa: detaloj de tiutempa vivo, rigardo de la okcidentanino al la realo post la "fera kurteno". La juna generacio verŝajne jam ne memoras, ke ekzistis en Eŭropo du diversaj politikaj sistemoj... Kaj ruĝaj steloj sur lokomotivoj memorigas tion al ni.

Plialtigas humoron la rakontoj sur la paĝo 8 - "ŝlosiloj" de ili ambaŭ estas en la ĉinoj. Do, nepre legu ĝis fino! Bill Thorne prezentas humuran FACILIGON por verkado de leteroj.

Por la rubriko "Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?" Rafija Jafasova kolektis filozofajn rezonojn de antikva Ĉinio, kiuj atestas, ke tiu demando okupis homajn kapojn dum ĉiuj tempoj.

Sube sur la sama paĝo ni prezentas sufiĉe konatan vortludon "ĉenoj" kaj proponas tri hejmajn taskojn. Fakte tre malmultaj sendas solvojn de niaj enigmoj al la redakcio, eble pro komplikoj, eble pro troa hontemo. Ni esperas, ke ĝuste tiaj taskoj pli plaĉos al vi.

Sur aliaj paĝoj vi trovos kiel ĉiam anekdotojn kaj korespondadresojn, kaj ankaŭ la ŝandan horaron de Ĉina Radio Internacia. Ne forgesu kontribui por nia gazeto rakonte, novele, verse kaj pentre!

AGRABLAN LEGADON!

La redakcio dankas s-inon CARMEN LLAPART el Hispanio por la donaco al "K" de 10000 hispanaj pesetoj

# KOMENCANTO

2000 numero 5/refondita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpaŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono: 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO.

Sola kondiĉo - nepre menci i KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokoj.

# Verkistoj de periodo de solidiĝo en E-literaturo

Karaj legantoj, sur la ĉi-numeraj literaturhistoriaj paĝoj ni volas prezenti al vi ankoraŭ du konatajn verkistojn de la Unua Periodo: ĉeĥan poeton *Stanislav Schulhof* kaj hungaran aŭtoron *Pál Lengyel*.

## Stanislav SCHULHOF

Stanislav Schulhof — ĉeĥo, naskiĝis en 1864 en Lipka, estis dentkuracisto kaj la ĉeĥa verkisto. Antaŭ sia esperantistiĝo verkis multnombrajn poemojn en la ĉeĥa lingvo.

Li aktive partoprenis en loka esperantista vivo en Pardubice, publikigis multajn prilingvajn artikolojn. Tridek originalaj poemoj de S. Schulhof estas kolektitaj en la tri volumetoj, la unua el kiuj "Per Espero al Despero", aperis en 1911, poste sekvis la dua "Kion La Vivo Alportis" - ankaŭ en 1911, kaj la tria "Aŭtunaj floroj", aperinta en 1912.

La poemoj estas rimarkindaj laŭ formo kaj laŭ enhavo. La plej konataj el ili fariĝis: "En la mondon venis nova sento", kiun muzikigis Heikiki Klemetti kaj kantis la finna ĥoro dum la Universala kongreso de Esperanto en Helsinko en 1922, kaj poemo "Desperanto", kie la aŭtoro ironie kontraŭstaris al la multaj naive idealismaj laŭdoj al nia lingvo en la unua periodo (de ĝia ekzisto).

Pri la verkaro de Schulhof bone skribis K. Kalocsay: "Tri volumetoj, en ili tridek poemoj. Konstanta evoluo kaj pliperfektiĝo. Prezentas sin homo, kiu simple kaj sincere rakontas al ni siajn sentojn kaj kies sentoj estas indaj por rakonti".

S. Schulhof mortis en 1919 en urbo Pardubice. Jam post lia morto, en 1920 aperis bona, kvankam malgranda, lia antologio el ĉeĥa poezio "Bohemaj grenatoj".

La verkoj de S. Schulhof ankoraŭ hodiaŭ emocias tuŝas la legantojn. Sube ni metas du el liaj poemoj.

## EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO

Al sinjoro KABE

Kia stranga, forta voko  
sonas en aero hela?  
Suno brilas sur lazuro,  
jam disfalas putra muro,  
ridas tago la plej bela.  
Ho, leviĝu mia gento,  
blovas juna, freŝa vento —  
*en la mondon venis nova sento.*

Jam leviĝu miaj fratoj,  
for de via ŝima ĉambro!  
Pala estas via sango,  
lacigita via vango,  
refreŝiĝu en la ambro.  
Sen kolero, sen turmento  
blovas juna, freŝa vento —  
*en la mondon venis nova sento.*

Malsaĝul' nur sidas hejme,  
hom' al kiu mankas koro.  
Nur por homo sen konfido,  
ĉagreniga invalido  
ne ekzistas sun' kaj floro.  
Por mi sola argumento:  
Blovas juna, freŝa vento,  
*en la mondon venis nova sento.*

Ĝuu vivon, amon, sunon  
ĉiuj gentoj, ĉiu raso!  
Jam aperas kun freŝeco  
radianta estonteco,  
ĉarma, sen la embaraso.  
Ho, ne dormu mia gento,  
blovas juna, freŝa vento —  
*en la mondon venis nova sento.*

## DESPERANTO

Dolĉe sonas via nova nomo,  
ĥo Espero, nia bela vorto!  
En la nokto plena je sopiro  
Vi, Espero, estas eliksiro,  
sed nur eliksiro sen la forto.

Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,  
kiel kontraŭ superakvo muro,  
sed vi estas sabla bariero,  
ĉiam disfalanta en aero,  
sed ni kredas je vi sen murmuro.

Tre agrable vere estas sonĝo,  
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,  
pri senĉesa homa harmonio,  
unu amo, unu familio,  
— sukeraĵo por la infaneco.

Ni atendas vane tempon belan,  
kiam regos sole via nomo.  
En eterna monda karuselo  
vi Espero restos ĉiam stelo,  
ĉiam malproksima por la homo.

Eĉ se iam jena tempo venos  
post jarmiloj, kaj post miliardo,  
tiam ree homon batos homo,  
sed li batos lin en via nomo —  
ankaŭ kun la stelo sur standardo.



Jurij Perevalov, [LESNOJ, Ruslando]

## Pál LENGYEL

Pál Lengyel — hungaro, (1862-1932) estis presejposedanto. En sia infaneco li restis sengepatra kaj lin edukis lia avino. En 1883 li fariĝis presisto kaj fondis presejon en sia urbo.

Esperantisto ekde 1897 kiam li hazarde trovis anoncon pri la unua hungara E-lernolibro, akiris ĝin kaj jam 2 tagojn poste skribis esperante leteron al la klubo de Uppsala (Svedio) kaj korespondis kun Payl Nylén - redaktoro de tiutempe sola E-gazeto "Lingvo Internacia". En 1900, kiam la gazeto troviĝis en la krizo kaj estis minacata de ĉeso, Pál Lengyel transprenis kaj je propra risko eldonis ĝin dum kvar jaroj en Hungario. En 1904 Lengyel kun sia familio migris al Parizo kaj tie kunfondis la eldonfirmon "Presa Esperantista Societo".

En 1905 li fariĝis membro de la tiam fondita Lingva Komitato, kaj en 1910 iĝis ankaŭ Akademiano.

Dum la unua mondmilito la francaj magistratoj metis lin, kiel hungaran ŝtatanon, kun la familio en internigejon kaj konfiskis lian tutan havaĵon ĝis ĉiuj liaj verkoj.

Nur en 1919 li povis reveni al Budapeŝto kaj labori tie kiel korektisto de presejo. Dum la postmilitaj jaroj P. Lengyel jam ne tie aktivis en la E-movado, pro malsano kaj malriĉo, tamen verkis por revuo "Literatura mondo" siajn rememorojn, kiuj aperis en ĝi en 1922-23 jaroj.

Krom tio, ke Pál Lengyel estis vaste konata kiel artikolisto, (verkis por la gazeto "Lingvo Internacia", por "La Revuo", "Literatura mondo" kaj estis redaktoro de la "Juna Esperantisto"), li verkis originale — jam en 1899 aperis "Libro de l'humoraĵo", kun bonhumoraj rakontoj; tradukis — en 1906 aperis en lia traduko rakonto de la hungara verkisto A. Abonyi "Mallumaĵo"; en 1907 — aperis lia scienca studo "La Kalendaro". Li ankaŭ tradukis hungaren la "Fundamento de Esperanto", en 1909, kaj kunverkis du gramatikojn.

La literatura heredo de P. Lengyel valoras por ni, legantoj, ankaŭ nuntempe. Sur nia literatura paĝo ni prezentas al vi, karaj amikoj, malgrandan humuran rakonteton de de Pál Lengyel.

## ENIA SAVO

### Arbaristo:

... La urso estas ja la plej danĝera besto. Se ĝi persekutas iun, li devas nepre morti. Se li forkuras, post li kuras ankaŭ la urso; se li rampas sur arbon, post li rampas ankaŭ la urso; se li saltas en akvon kaj penas sin savi naĝante, post li naĝas ankaŭ la urso...

### Aŭskultanto:

Kaj se oni sin kaŝas?

### Arbaristo:

Tiam kaŝas sin ankaŭ la urso



La redakcio kolektas materialojn kaj intencas sekventjare lanĉi rubrikon, pri esperantistoj, kiuj nun estas spertuloj kaj dum multaj jaroj aktive kaj fruktodone agas en E-movado, sed iam ankau estis komencantoj. Precipe nin interesas kiel ili iĝis esperantistoj, trovis sian vojon al la internacia lingvo.

Sed okazis tiel, ke proksimumoj de la heroo de nia artikolo sendis al ni priskribon de lia vivo kaj esperantistiĝo ĝuste en la momento de lia 85-jara jubileo — do, ni decidis, ne atendante la venontan jaron, publikigi tiun materialon, des pli ke vivo de nia abonanto kaj vaste konata esperantisto Timofej Ŝuvaĵev estas tre neordinara kaj inda por rakonti pri ĝi.

## La granda vivo de Timofej ŜUVAĴEV

Li naskiĝis la 10-an de julio 1915 jaro, en Stavropola gubernio de Rusia Imperio. Junaĝe lin frontis la Civitana milito en Rusio. Orfa vagabondo, li iĝis filo de "infan-rifuĝejoj". Fine el unu el tiuj orfejoj oni direktis lin lerni agrikulturon al Moskvo. Li lernis diligente kaj por praktikaj studoj vizitis la famegan agronomo-scienciston *Ivan Vladimiroviĉ Miĉurin*.

Tie li praktikis siajn konojn pri botaniko kaj ĝuste tie, en la urbo Kozlov, li eksciis pri Esperanto. La mondfama botanikisto Ivan Miĉurin estis, cetere, grava subtenanto de la internacia lingvo.

Timofej Ŝuvaĵev rimarkis lernolibron, kiu kuŝis sur la tablo ĉe Miĉurin kaj demandis: "Kio estas Esperanto?". Miĉurin klarigis al li ĉiujn avantaĝojn de la internacia lingvo, rakontis, kie akiri necesan literaturon.

Ekde tiu tempo Timofej Ŝuvaĵev - senlaca propagandisto de Esperanto, kiu ludas en lia vivo rolon pli, ol ordinara hobio.

Centoj kaj miloj da adresatoj el la tuta mondo ricevadas liajn "leterojn de amikeco" kaj "salutojn el Niĵnevartovsk", la "nafta ĉefurbo" de Siberio, kie li loĝas dum pluraj jardekoj.

Timofej Ŝuvaĵev senŝanĝe gvidas la urban Esperanto-klubon "ESPERO". Multaj dekoj da novaj esperantistoj aperis el sub lia "flugilo".

Li diplomiĝis kiel agrikulturisto, sed ne laboris kiel agronomo, ĉar venkis en lia animo pasia intereso al historio.

La Duan mondmiliton Timofej Ŝuvaĵev militis kiel soldato ekde la komenco ĝis la fino, estis kelkfoje vundita.

Post la milito kaj kuracado en hospitaloj li decidis veturi al Kamĉatko, sed laŭvoje oni lin "reagitis" por la Tjumena regiono. Li laboris kiel pedagogo, lerneja direktoro. Gvidis historion, geografion, biologion, kemion.

Lia emo al historio stimulis lin al la esploroj pri historio de tiu norda regiono. Fakte li okazis pioniro. Kune kun siaj lernantoj Timofej Ŝuvaĵev vojaĝis laŭ arbaroj kaj riveretoj, serĉadis spurojn de la antikvaj prahomoj, arkeologiis. Rezulte Tomska universitato publikigis liajn regionesploran libron "Niĵnevartovsk".

Malgraŭ siaj 85 jaroj Timofej Ŝuvaĵev restas aktiva, vivama kaj energia. Ni gratulas lin okaze de lia jubileo kaj deziras multajn jarojn de la fruktodona laboro!

Dum kelkaj jaroj mi loĝis kaj laboris en Niĵnevartovsk kaj havis plezuron konatiĝi kun Timofej Ŝuvaĵev persone.  
Redaktoro de "K" Viktor Kudriavcev

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

# AFORISMOJ

kolektis kaj esperantigis  
**Naila Sadritdinova**  
[TAŜKENTO, Uzbekistano]

*Forto ĉiam simpatias al  
homoj kun malaltnivela mo-  
ralo.*

{Alberto Ejnstejn}

*Kiu scias fari - faras. Kiu  
ne scias - instzuas.*

{B. Sou}

*Amiko estas homo, kiu  
scias pri vi ĉion kaj malgraŭ  
tio ne ĉesas vln ami*

{E.G. Habbart}

*El ĉiuj hejmaj kuzaciloj  
la plej bona estas bona  
edzino.*

{K.Habbart}

*Feliĉo - kiel sano, se oni  
ne rimarkas ĝin, do, ĝi  
ekzistas.*

{I. Turgenev}

*Muziko dum tagmanĝo  
estas ofendo kaj poz kult-  
isto, kaj poz violonisto*

*Paradokso de kuzaĝo  
konsistas en tio, ke homo  
devas neglekti sian vivon por  
savi ĝin*

{G. Ĉesterston}


kolektis kaj esperantigis  
**Margarita Zujeva**  
[Moskvo, Ruslando]

*Novaĵ pensoj, eĉ la  
propraĵ, ne rapide konkeras  
niajn simpatiojn. Oni devas  
alkutimiĝi al ili.*

{Lev Ŝestos}

*Neniam estas malfrue  
komenci ĉion de la komenco*

*Venko ne estas neĝo.  
Mem sur la kapon ne falos.*



**Nina Vinnikova**  
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

Kolektis kaj esperantigis  
**Bill Thorne**  
[LONDONO, Britio]

ANONCO!  
ESTAS GRANDA  
DANĜERO!  
Se vi ne scias legi,  
demandu ĉe la viandisto!

*Por ludi ĵazon, fuŝu  
bonan melodion*

*Se mi scius, kie mi mortos,  
mi tute ne izos tien*


*Ne eblas vinkti najlon en  
kzemaĵon*

*Mi estas atelsto, dank'al  
Dio*

*La unua premio estos:  
unu semajno en Bruselo*

*La dua premio estos:  
du semajnoj en Bruselo*

## DUELO



**Jurij Perevalov**, [LESNOJ, Ruslando]



# SOMERO 1958

*Niaj malnovaj legantoj espereble memoras, ke la ĉefa temo de pasintjara KOMENCANTO estis "E-to kaj turismo". Ni rakontis kiel vojaĝi helpe de la internacia lingvo kaj petis la legantojn rakonti pri siaj spertoj, ligitaj kun tiaj vojaĝoj.. Tiun ĉi rakonton de s-ino Florian nad Metuji el Nederlando ni ricevis jam fine de la jaro, iom malfrue. Tamen la rakonto ŝajnas esti interesa, ĉar priskribas momentojn, pri kiuj la juna generacio jam ne memoras. Jes, ja estis en Eŭropo du mondoj, orienta kaj okcidenta. Kaj pendis inter ili la "fera kurteno" kaj miloj da kilometroj de "pikila drato".*

*Sed Esperanto ankaŭ tiam estis ponto inter homoj kaj donis al siaj posedantoj multajn agrablajn momentojn en la vivo.*

Meze de aŭgusto mia edzo Johano kaj mi frumatene forlasis nian hejmon postsvingsalutataj de niaj gefratoj Annie kaj Leon, kaj veturis per tramo 3 al la stacidomo, kie ni eniris la jam atendantan Jugoslavio-ekspreson. Baldaŭ venis niaj gefratoj Jopy kaj Kees por iom babili kun ni kaj adiaŭi nin.

Je la oka la vagonaro ekveturis kaj nia vojaĝo estis komenciĝinta. Ni ruliĝis kelkajn horojn kaj jam Nederlando kuŝis malantaŭ ni kaj veturis ni tra Gernanio.

Ĝis la urbo Bonn la pejzaĝo ne tre multe diferencis de nia ebena loĝregiono, sed de tiam ĝi fariĝis monteta kun kasteloj sur la suproj kaj pentrindaj vilaĝetoj, algluitaj al la deklivoj.

Ni daŭre veturis preter Rejno kaj ĝuis la belegan panoramon, la tempo rapide pasis. Vespere la vagonaro atingis la urbon Nürnberg, ni eliĝis kaj promenis al nia hotelo "Kaiserhof".

En la hotelo la akceptisto subite komencis paroli nederlandlingve. Li estis laboranta kvar jarojn en la hotelo "Centraal" en Amsterdam. Dum la matenmanĝo sekvonttage la kelnero rakontis al ni, ke li dum la milito estis en Nederlando kiel soldato.

En la daŭro de la mateno ni adiaŭis la hotelkunlaborantojn kaj promenis al la stacidomo. Ni trovis la ĝustan kajon kaj post kelka tempo alvenis Oriento-ekspreso el Parizo. Ni eniris ĝin. La kunvojaĝantoj en la kupeo estis ĉeĥoslovakoj kaj poloj, la atmosfero estis agrabla, reciproke estis prezentataj frandaĵoj.

La pejzaĝo fariĝis daŭre pli bela, ni ĝuis multe. En la limurbeto Cheb la vagonaro longan tempon staris. Ni nun troviĝis sur ĉeĥoslovaka teritorio. Doganisto venis en la kupeon por kolekti la pasportojn, preter la vagonaro paŝis soldatoj kun

pafiloj. Eniris la kupeon viro kun poŝlanterno, li surgenuiĝis kaj direktis la lumon sub la benkojn, poste li restariĝis kaj el inter la multaj kofroj kaj valizoj prenis unu mansaketon, kiun li iomete traserĉis.

Estis notata, kiom da mono oni havas ĉe si. La pasportojn ni rricevis, kaj fine la vagonaro ree ekveturis. Ĉluj lokomotivoj, kiujn ni poste vidis, kaj ankaŭ la nia, portis grandan ruĝan stelon sur la nazo. En la stacidomoj estis vidataj florar-dekoroj kun socialismaj sloganoj.



Ni veturis kaj veturis, ni estis tre ĝojaj troviĝi en Ĉeĥoslovakujo. Vespere la vagonaro alvenis al Praha, kie ni ĝin forlasis. En la stacidomo ni iom atendis nian amikinson Jarmila, sed ŝi ne ĉeestis. Ni iris al la sekcio *Informado* kaj parolis tie kun Ĉedok-kunlaborantino. La sinjorino donis al ni kelkajn monerojn por la tramo, ĉar ni ankoraŭ ne disponis ĉeĥoslovakajn kronojn. En tramo ni komprenis, ke ni devas pagi por tri lokoj, la pakajo ankaŭ estis kalkulata, sed ni havis nur monon por 2, ni estis en embaraso, sed ĉeĥo, kiu ekparolis germane kun ni, klarigis la aferon al la kondukistino, kiu konsentis.

Ni eltramiĝis ĉe haltejo "Flora", nia hotelo, en la Lucemburska strato, ni eniris ĝin kaj prezentiĝis ĉe la akceptistoj.

Sekvonttage ni matenmanĝis en la *kavarna* (kafejo), tie venis al ni ĉeĥo, kiu parolis esperanton. Li akompanis hungaran familion: profesoro pri pluraj lingvoj kun la edzino kaj filo, ili sufiĉe miris, ke la ĉeĥo kaj ni povas facile interparoli. La ĉeĥo estis entuziasmita kaj diris al ili - "nun vi vidas kiel utila esperanto estas."

Ni finis manĝi kaj iris eksteren por trovi templon, ni ĉeestis meson en la "Sankta Koropreĝejo", situanta nemalproksime de "Flora". La multnombraj kredantoj kantis ĉeĥlingve, kio sonis impresive. La diservo finiĝis, ni forlasis la kirkon kaj promenis al la Venceslav-placo. Per indikoj de kompleza policisto ni venis en la celitan straton kaj haltis ĉe la domo kie amikino Jarmila loĝis.

Ni sonorigis kaj la pordo estis malfermata de juna blonda sinjorino, evidente Jarmila, ruĝiĝinta kaj konfuzita; ŝi bonvenigis nin kaj petis eniri, ŝia loĝigistino ankaŭ venis nin saluti. Kvarope ni agrable konversaciis ĉe trinkado de teo kaj frandado de kuketoj.

Jarmila invitis nin iri kun ŝi en la urbon, ŝi gvidis nin al la "Sankta Vito-katedralo", al la *ora strateto*, kie en la antaŭa tempo alĥemiistoj devis fari oron por la reĝo en siaj malgrandaj dometoj. Ni vidis la "Dalibor-turon" kaj promenis sur la "Karolo-ponto". Jarmila, kiu estas arĥitektino, montris al ni ankaŭ novkonstruaĵojn. Ni trinkis ion sur teraso apud la rivero Vltava. Ĝuinte belajn horojn, Jarmila nin kondukis reen al hotelo "Flora", de tie ŝi iris al sia edzo Ludvik, kiu estis asista pastoro.

Sekvontmatene Ludvik, same aminda persono, kaj Jarmila venis al nia hotelo kaj per tramo iris kun ni en la urbon, kie ili vidigis al ni la dek du apostolojn en la urbodoma turo, kiuj ĉiuhore aperas ĉe du fenestroj.

En sia malgranda preĝejo Ludvik bele ludis organon por ni. Ni trinkis limonadon en tegardeno kaj reiris al "Flora".

Posttagmeze ni en nia ĉambro atendis telefone anoncitan viziton de amiko, loĝanta ekster Praha. Fine aŭdiĝis pordofrapo kaj eniris Vladimir, dika kaj ridanta, en fervojista uniformo, li venis rekte de sia laboro. Li donacis libron al Johano kaj bombonojn al mi. Ni iris ankaŭ kun li en la urbon, ni vizitis kirkon.

Vladimir estis dirinta al ni ke li estas ateisto, en la preĝejo li faris krucosignon per benita akvo kaj demandis: "Florian, ĉu ne ankaŭ vi devas tion fari?" - do mi faris tion je granda gajo de la amiko. En la templo troviĝis sennombraj statuoj



de sanktuloj, mi devis citi iliajn nomojn, la amiko estis kvazaŭ ekzamenanto.

Ni vizitis kun li ankoraŭ grandan magazenon, "Bita Labut" - ("Blanka Cigno"), kie estis vendataj dentobrosoj kaj motorcikloj *Jawa* kaj ĉiuj artikloj inter tiuj du.

Ni triope reiris al hotelo "Flora" kaj vespermanĝis, je la oka venis Jarmila kaj Ludvik, pli poste aliĝis al nia societo belga paro, la sinjorino estis esperantistino, ni travivis agrablajn horojn ĝis malfrue..

Post nia restado en Praho ni ankoraŭ renkontiĝis kun geamikoj en aliaj lokoj — Teplice, Nachod, Potštejn, preter la lasta urbeto fluas forte murmuranta, ŝaŭmanta rivero Divoka Orlice (Sovaĝa Aglino), ni ne satiĝis rigardi kaj aŭskulti ĝin, tiel belega ĝi estas.

Nun ni ree estas hejme kaj jam multon rakontiĝis pri niaj vojaĝtravivaĵoj al interesantoj, rezulte niaj fratino Jopy kaj amikino Cor intencas lerni esperanton por poste povi korespondi..

Pastro Andreo Cseh, al kiu mi telefonis, promesis skribi en "La Praktiko" ke la Ĉeĥoslovakaj esperantistoj volonte renkontiĝos kun samideanoj el okcidentaj landoj.

*Florian nad Metuži.*

Anton Makunin

Esperantigis **Artur Hlomatullin**

[TROICK, Ruslando]

# PERSONA PETO

- Kuzovkov, venu al radioparolo!
- Kuzovkov estas ĉe la parolo!
- Kiel funkcias la sistemoj?
- Ili funkcias normale, Pjotr Petroviĉ.
- Kiel fartas vi?
- Normale.
- Kiel fartas la teamo?
- Normale.
- "Normale, normale". Kiel estas fakte?
- Fakte ankaŭ normale.
- Bone. Ĉu vi mian personan peton ne forgesis?
- Kiel eblas, Pjotr Petroviĉ! Kiam mi povas komenci?
- Post unu horo - kiam ĉe ni vesperiĝos.
- Mi vin komprenis. Sed kiom necesas al vi?
- Nu, kvin-ses, decidu mem...
- Mi faros sep-ok. Por plena garantio. Kiajn vi preferas - grandajn aŭ helajn?
- Faru kaj grandajn, kaj helajn.
- Ne maltrankviliĝu, Pjotr Petroviĉ, ĉio estos normale.
- Ĉu denove "normale"?
- Sed kial ne? Vi ja mem instruis en la Centro de Trejnado: "Ĉe kosmonaŭto ĉio devas esti normale!"
- Bonege, Kuzovkov! Nur estu atenta, nenion superfluan for-pafu - iun planedon aŭ sputnikon.
- Restu trankvila, Pjotr Petroviĉ. Ĉu mi stelon kaj sputnikon ne distingas? Ne ofendu min!
- Bone, Kuzovkov, helpu! Iam mi mem flugis - mem for-pafis, sed nun mi vin petas - ĉar ŝatas ŝi, mia Katerina, kiam falas steloj, ŝi la dezirojn elpensas...
- Mi vin komprenis. Jam pretas.
- Sukcesojn al vi, Kuzovkov! Atentu, la pafilon ne forgesu!

**Irina Sabirova**


{KIZILSKOJE, Ĉelabinska reg., Ruslando}

Esperantigis

**Alla Utkina**

[LESNOJ, Ruslando]

Mia  
kara,  
intima  
amiko ...



Ĉio iam finiĝas. Pli aŭ malpli frue. Tiel okazis ankaŭ al mi...

Sekve, neniam plu mi ekvidos mian karan, ne serĉos palpebre tiujn blankajn sveltajn fingrojn kun diafana haŭto.

Miaj gepatroj ne ekamis aperon de tiu evento en mia vivo. Ili insultis, hontigis min, sed mi ekamiĝis kaj ne povis forlasi la amatinon.

Ĉar tiu estis mia intima amiko. Ni estis nedisigeblaj. La fakto de ties ekzisto estis al mi konsolo kaj ĝojo - sensona, neanstataŭebla kaj senlime sindonā.

Mia kara povis esti diversa - malbona kaj bona, belege ornamita kaj malkara.

Sed kiam mia kara estis apude, mi sentis, ke mi ne pereos, toleros ĉiujn malfeliĉojn kaj malprosperojn.

La amata varmigis mian spiron dum frosto, lumis en malhelo de malproksimaj vojaĝoj kaj somere helpis pasigi la tempon apud lignofajroj sur arbarkampoj.

Ni pasigis longajn vesperojn apud televidilo, mia kara estis neanstataŭebla kompaniano. Kaj mi eĉ ne pensis pri adulto...

Nun mi restiĝ sola.. Mia kara foriris por ĉiam, lasinte en mia ĉambro facilan, unikan odoron, spican aromon...

Nia tempo pasis. La tempo pasinta neniam revenos. Sed ĉiam restos en mia memoro mia amata. Malfacilas paroli...

Larmoj sufokas min, sed mi tamen toleros, venkos..

Adiaŭ mia amatino!

Adiaŭ, cigaredo!!

Hodiaŭ mi ĉesis fumi!!!

Ni dankas nian abonanton Tomas Alexander el Usono pro la afabla rimarko, kiun li sendis en la redakcion post la tralegado de KOMENCANTO-4 kaj notis, ke vera aŭtoro de unu el rimarkoj sur la paĝo 8 estas ne komencanta aŭtoro Sabirova Irina, kiu sendis ĝin por la gazeto, sed "neniu alia, ol Claude Piron".

Nun ĉio estas klarigita. Ni petas pardonon ĉe la legantoj pri bedatrinda eraro kaj publikiga la originalon de la rimarko.

Unu, du, tri, kvar  
Fisaj naĝas en la mar'.  
Kvin, ses, sep kaj ok  
Birdoj sidas sur la rok'.  
Salvas naŭ, kaj poste dek  
Unu fis' en ĉiu bak'!

- Claude Piron




**Bill Thorne** [LONDONO, Britio]

# Faciligigo

Kia teda tasko estas respondi al leteroj!

Nun ekzistas FACILIGO!

Nur notu kie taŭgas:



Kara: sinjoro  karegulo  patrino  Reĝa Moŝto  kiu ajn

Mi tre dankas vin pro via: letero  poŝtkarto  konsilo  poŝtĉeko

Mi ĝojas, ĉar vi estas: bonstata  analfabeta  ekster malliberejo   
denove en malliberejo

Kial vi ne: venĝu lin  edziĝu kun mi  falu morta   
iru al kuracisto  piedfrapu ĝin forte

Ĉu vere, ke vi estas: frenezanta  graveda  ege riĉa   
bankrota  jam amindumanta kun najbaro

Mi intencas: serĉi skribilon  voki fajrobrigadon   
surmeti pantalonon  iri al Bruselo

Mi ĵus: faris kurson de leter-skribado  perdis tri dolarojn   
konsilis al la registaro

Vetero estas: tre brua  la sama kiel la via  uragana

Atentu pri: hieraŭa tago  falantaj elefantoj   
Elvis Presly  (Li vivas!)

Ne forgesu: surmeti pantalonon  pagi por pafila licenco   
aliĝi al la Amnezia Societo   
forpeli tiun krizon el via menso  sendi al mi monon

Informu min: se vi ne ricevis ĉi tiun leteron  kiam vi mortos   
pri loteriaj numeroj  pri telefonnumero de via amanto

Lastatempaj novaĵoj: hundo formanĝis vian leteron  domrabisto  
formanĝis malfreŝan kolbason, kiun mi forgesis forĵeti, li malsaniĝos,  
certe. Bone, ĉu ne?

Multajn bondezirojn  Ĝis la reskribo  Estu riĉa,  kontenta

sinceré via: malnova amiko  nova amiko.



# Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

## Filozofaj rezonoj de antikva Ĉinio

esperantigis **Rafija Jafasova**  
[EKATERINBURG, Ruslando]

### Sun Czjehen

Multaj homoj senĉese pensas pri famo kaj profito, sed unuvoĉe malbenigas tiun mondon kiel "malpura mondo" kaj "oceano de suferoj".

Ili komprenas nek belecon de nuboj, nek bluecon de montoj, nek susuron de roĝo, nek solidecon de ŝtono.

Ili ne scias, kiel floroj ridetas al la birda pepado, kaj kiel en la valoj reehas la kantoj de lignohakistoj.

Ili ne scias, ke la mondo ne estas malpura kaj en la oceano de vivo mankas suferoj, sed nur iliaj propraj koroj rustiĝis pro la koto kaj peziĝas pro zorgoj pri fi-famo kaj profito.


\* \* \*

Kiam la riĉeco, famo kaj gloro akiriĝas per bonaj aferoj, ili similas al floroj, kreskantaj libere en kampoj.

Kiam ili akiriĝas per meritoj, ili similas al floroj, kreskantaj en florbedo.

Kiam ili akiriĝas per potenco, ili similas al floroj en vazo, fortranĉitaj de la radikoj kaj destinitaj velki.

Nina Vinnikova, [N-ALTAJSK, Ruslando]



### Sjuz Sjuemo

La avarulo povas kolekti grandegan riĉaĵon. Sed se okazos al li malfeliĉo, li similos al muso, subpremita sur la strato.

Homo kun la vasta animo povas mizeriĝi.

Sed se al li okazos malfeliĉo, li similos al kvardekpieda raŭpo, kiu perdis nur kelkajn piedojn.

# El la *tero* kreskas *bero*

salo	kanti
valo	kapti
balo	kapto
bato	karto
sato	korto
savo	korno
sako	forno
ŝako	forko
ŝafo	forto
kafo	farto
kavo	marto
kuvo	marko
---	---
---	---

Estas vaste konata vortluda amuziĝo, kiun oni precipe praktikas en trejnadaj dum e-lecionoj.

La regulo estas simpla: oni devas fari la sekvan vorton, ŝanĝante nur unu literon en la antaŭa.

Kaj tiel plu, ĝis senfino... vi povas konstrui vort-ĉenojn

Maldekstre ni donas ekzemplojn, dekstre ni proponas fiksitajn taskojn.

Tamen ni volonte publikigos viajn vort-ĉenojn, kiujn vi elpensos kaj sendos al ni.

Vi povas fari: senfinan ĉenon, el kvar kaj plu-literaj vortoj.

Vi povas fari plej kurtajn ĉenojn, kondiĉe ke ĉiuj literoj de la komenca vorto plene ŝanĝiĝos

Vi povas plenumi viajn fantaziojn kiel ajn vi volas!

Ni atendas viajn respondojn.

marko	kolo
↓	↓
↓	↓
↓	↓
poŝto	↓
	↓
	↓
	↓
	↓
	↓
	↓
	↓
kafo	↓
↓	↓
taso	fino





**Aleksas Masjukas**  
[MURMANSK, Ruslando]

*El lerneja humuro*  
(traduko el la pola)

La instruisto demandas la lernanton:

— Kio estas klero ?  
— Klero, - respondas tiu, - estas: ni multon  
ellernas, poste multon forgesas, do la restaĵo  
estas klero.

— Novak, ĉu vi lernas aŭ ne?  
— Jes, sinjoro instruisto.  
— Kial do vi faras tiom multe da eraroj?  
— Mi lernas per eraroj.

La instruisto demandas:

— Diru, Jaĉjo, kiu estas tempo:  
mi banas min  
vi banas vin  
li banas sin

Jaĉek: — Estas sabato. Posttagmezo.

Instruistino:

— Se mi diros: MI ESTAS BELA,  
kiu estas tempo?

— Pasinta, - respondas la lernantoj.

— Kiun ni nomas DIKTATORO ? - demandas  
instruisto.

— Napoleonon.

— Sed kial?

— Li scipovis dikti samtempe kelkajn leterojn.

Instruisto:

— Kia estas tempo, se mi diros: "Ĉiuj infanoj  
dormas".

— Nokto, - respondas la lernantoj.

**Margarita Zujeva**

[MOSKVO, Ruslando]

— Kial vi petas tiom grandan salajron? Vi ja nenion  
komprenas en tio, kion vi faras!

— Sed ĝuste tial labori estas speciale malfacile!

— Por mi ĉiam estis malfacile inviti hejmen amatan  
junulinon

— Pro kio?

— Dekomence kaŭze de la gepatroj, nun pro la edzino

— Kiel eblas trovi vin ?

— Interkonsentu pri la renkontiĝo kun mia sekretariino.

— Kun ŝi mi jam interkonsentis. Sed mi volas renkontiĝi  
kun vi.

— Kaŭzo de via malsano - alkoholo!

— Dankon, vi estas la unua kuracisto, kiu ne kulpigas sole  
min.

— Kiel la vivo monotonas!

— Kial?

— Hieraŭ mono mankis, hodiaŭ mankas...

— Nuntempa junularo tiel strange sin vestas. Jen,  
ekzemple, tiu fraŭlino

— Tiu ĉi estas mia filo.

— Pardonu, mi ne sciis, ke vi estas lia patro.

— Mi ne estas patro, mi estas patrino.

— Neŭrozo, pri kiu suferas via edzino estas nedanĝera, ŝi  
povas vivi kun ĝi dum multaj jaroj.

— Sed mi ???

— Pro kio vi tiel dikiĝis?

— Pro oranĝoj.

— Ĉu vi manĝas ilin tiom multe?

— Mi ilin ne manĝas, mi komercas per ili.



**Bill Thorne** [LONDONO, Britio]

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

s-ro Klaus Rieman  
deziras korespondi pri lingvoj  
en Ruslando, parolas ankaŭ  
angle, ruse ktp

Maximinerweg 45  
54664 AUW a.d. Kyll

**GERMANIO**

klausu27@hotmail.com

s-ino *Šašunova Irina*  
volas korespondi tutmonde.  
Ŝatas pentroarton, vojaĝojn,  
sporton, pk pri naturo.

Gerojev Maloj zemli, 55-49  
VOLGOGRAD  
400086

**RUSIO**

*Tapani Lappalainen*  
42 jara fraŭlo, volas  
korespondi tutmonde pri  
diversaj temoj

Hauralantie 48,  
FI-37500, Lempäälä  
**FINNLANDO**

*Gelernantoj 11-15 jaraj*  
serĉas korespondamik-  
ojn tutmonde. Nepre  
respondos.

pk 140, KIEVO  
UA-254201

**UKRAINIO**

**Spiritista E-rondo**  
serĉas kontaktojn kun similaj  
grupoj tutmonde

Rua Tammandare,  
594-Campos Elisios,  
BR-14085-070,  
Ribeirao Preto, SP,

**BRAZILIO**

*Wei Jianhua*  
Kun gaesp-istoj tutmonde  
pri ĉiuj temoj. Pk, pm,  
moneroj ks interŝanĝi.

P.O.Box 3, CN-063000  
TANGSHAN,

**ĈINIO**

*Dariusz Piatkowski*  
komencanto, deziras kor-  
espondi pri diversaj temoj

ul. Sw. Franciszka 21/12a,  
LODZ  
PL-93485

**POLLANDO**

f-ino Aija Lazdina  
26 ja., studentino dez. kor-  
espondi tm pri diversaj temoj

"BULLOS"  
P/N Dzimtmsa,  
LV-3911,  
Baukas Raj.,

**LATVIO**

*M.Mehdi Noruzi*  
30 jara fraŭlo volas  
korespondi kun inoj

Box 838, Neŝat St.,  
IR-81465

**ESFAHAN  
IRANO**

klubo "ESPERANTO"  
10-20 jaraj geklubanoj  
dez. kor. tm pĉt.

60 let Oktjabrja, 6-135,  
Nijnevartovsk  
626440

**RUSIO**

s-ro *Korsos Tamas*  
20 ja., studento,  
korespondi tutmonde

Vorosmarty u. 20/B.  
HU-6528

Batmonostor  
**HUNGARIO**

*Francoise Goetz*  
instruistino hispanlingva, lernis  
la portugalan kaj dez. Kor. Kun  
brazilanoj en E-to kaj portugala

"Le Souchet"  
FR-03 120

**CHATELUS  
FRANCIO**

*Internacia Koresponda  
Esperanto-Klubo*  
serĉas novajn gemikojn tm. Ni  
eldonas la gazeton por abonan-  
toj-klubanoj. Skribu:

Morgun Timur, ab.k 279,  
LIPECK, 398050,

**RUSLANDO**

*Rudolf Zoldos*  
korespondi tutmonde  
pri diversaj temoj

24420

KANJIZA,  
Hercegovačka 1  
**JUGOSLAVIO**

*Svetlana Naumoviĉ*  
22 ja., studentino, kome-  
ncantino, dez.kor. tutmonde pri  
ĉiuj temoj (muziko, kino,  
literaturo, pentrado...)

Zapoljnaja, 39  
TJUMENO, 625000

**RUSLANDO**

*Ester Azevedo de  
Ramirez*  
Turisma gvidistino. Interesiĝas  
pri kutimoj kaj tradicioj de  
diversaj landoj kaj nacioj

Grimaldo del Solar, 159,  
Miraflores, LIMA,

**PERUO**

## ĈINA RADIO INTERNACIA horaro de Esperanta disaŭdigo

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00-11:30	Japanio,	41,84	7170
	Koreio	31,46	9535
13:00-13:30	Sudorienta	25,86	11600
	Azio	25,34	11840
20:00-20:30	Eŭropo	40,51	7405
		30,11	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43	6860
		43,17	6950

UTC - tempo de Grinviĉa meridiano

CET - Centra Eŭropa tempo

CET=UTC+2horoj

## KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn.  
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" aŭ ĉe via landa peranto

